

Aŭstraliaj Esperantistoj

Novajletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale

PLENUMITA 02/01/2019 Kvarcentkvindeknaŭa eldono (unua eldono 20/09/2011)



Subtenu vian Novajleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

Uzindaj ligoj [reta-vortaro](#) [Freelang Vortaro](#) [Plena Ilustrita Vortaro](#) [Duolingo](#)

[Google Translate](#) [Pasintaj AE eldonoj](#) [duolingo entute](#) [lingvohelpilo](#)

[Esperanta Retradio](#) [Esperanta himno](#) [PMEGramatiko](#) [openclipart](#)

Oni povas meti sian nomon, retadreson, urbon kaj landon al la listo de ricevantoj. rspring@tpg.com.au

Entute **772,000** lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas **287,000** lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)


Nun studas **263,000** lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas **222,000** lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Gramatika serio "La Verbo en P.A.G." N.ro.101



Se do la tria parto de frazo povas esti nur unu, simpla aŭ kompleksa, Objekto, la kvara parto enhavas ĉiujn Adjektojn, ja komplementojn de la Predikato: "Ni loĝas EN LA KAMPARO".

Tiu kvara frazparto ne bezonas enhavi iujn ajn Adjektojn: "Ni manĝis salaton", kaj povas enhavi iun ajn nombron da Adjektoj: "Ni manĝis HIERAŬ EN LA FRUA MATENO EN LA ĜARDENO PRO LA MILDA TEMPERATURO".

La Adjektoj havigas la diversajn cirkonstancojn de la Predikato, kaj ne bezoniĝas dividi tiujn, ĉar ili havigas ĉion escepte de la Subjekto kaj de la Objekto kaj de la Predikato mem. Ni simple nomu ĉiun cirkonstancon Adjekto. Tio sufiĉas. Ni nur bezonas rekoni la Adjekton kiel tian, kiel parton de la kvara frazparto. Sed kio pri la formo? Proksimfoje.

Marcel Leereveld.



La Manlia Esperanto-Klubo

Anoj kunvenas la unuan kaj trian sabatojn je la 10atm.

Bavarian Beer Café, Manly Wharf. Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.

La 4a de Junuaro estos la unua sabato de la jaro. Venu!

Roger Springer



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Esperanto-Domo Sidnejo

Zamenhoffesto en Sidnejo

La 14-an de decembro okazis la Zamenhof-festo en Sidnejo kun multaj partoprenantoj, interalie du eksterlandanoj: Rainer el Germanio kaj Julio, kiu loĝas en Dubai kaj laboras por flugkompanio. Dum la evento ni interparolis kun aliaj eksterlandaj Esperantistoj per Skajpo. Mi mem faris demandojn pri Zamenhof kaj lia familio. Mi konstatis, ke eĉ longdaŭraj Esperantistoj ne scias tiom multe pri la familio de Zamenhof.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La fama nepo de Zamenhof forpasis ĉi-jare en oktobro, sed unu el la du pranepinoj de Zamenhof: Margaret estas bona Esperanto-parolanto kaj partoprenis plurajn Universalajn kongresojn dum la pasintaj jaroj.

Ni havis belan kukon. Vidu foton. Mi ankaŭ aldonas fotojn sur kiuj vi vidas kelkajn el la partoprenantojn.

Amike, **Nicole Else** Sekretariino de Esperanto NSW.



Kongreso en Burundo KONGRESUMI BURUNDE

Preferinde krei ion novan kiam la vivo ankoraŭ permesas. Burundo estas paca lando spite la onidirojn de kelkaj internaciaj organizaĵoj. Tiuj organizaĵoj kulpigas la registaron pro militoj, konfliktoj, postulemaj impostoj, politikumada manipulado enlande, malsekureco ktp. Tamen, reale kaj konfese, estas enviinde loĝi en tiu ĉi lando kie kurento, akvo, sekureco, retumado estas preskaŭ senpage pro rapideco de la retkonekto kaj malmultkosteco de la kreditoj por megabajumi. Ne indas ke, eksterlandoj kaj ĉirkaŭaj landoj de Burundo papagu la sensencajn malamegajn vortojn de la koloniistoj. Kompare kun la 73-a IJK-o en Aneho-Togolando kiun ni partoprenis antaŭ du jaroj, ĉiuj gekongresanoj komence ĝis la Kongresfino ĉiam fartis sane, feliĉe kaj ameme, kvankam la manĝaĵo estis centprocente sub la titolo de la preĝo: PATRO NIA, do preskaŭ ĉiuj plendis pro la sama manĝaĵo: fazeoloj kun rizaĵo kaj terpomoj ĝis la lasta tago de la Kongreso.

Tiu 7-a AK-o, kies kongresa titolo estis Verdigi Afrikon per Esperanto, tra Esperanto kaj pro Esperanto, estas nia opinie la veran titolon kiun la LKK-anoj kaj ANEB-anoj elekte selektis pro tiu mojosa AK-o neanstataŭeblema! Ni rimarkis multfoje dum la kongreso diversajn intereseĝajn temojn ege diskutindajn kaj parolindajn kiujn ili afiŝis en la afiŝejo. La celo estis alvoki la esperantianojn kaj la esperantistojn al paco, al

esperantrefratiĝo, al engaĝiĝemado en la instruado de tiu verda lingvo Esperanto. Esperantistoj entuziasmiĝis kaj diskutadis

kiamaniere esperantumi sen perforta komunikado, ekrlati kune kun aliaj organizoj tute neesperantaj, varbadi pri Esperanto per diversaj liliptaj rimedoj sen troige fari falsajn promesojn kaj promesaĵojn al gelernantoj. Ĉiuj gekongresanoj interesiĝis kaj pasigis tempon aŭskultinte, scivoleminte kaj naskiĝis spirita demandemeco pri tiuj mojose kulturaj temoj prelegitaj en diversaj prelegĉambroj, inter ili Ĉambro Kafo, Ĉambro blanka ktp. Okazis ke, kelkaj temoj estis tiklaj, ekz, kiam iu esperantistino prelegis pri SENDEPENDIĜO de afrikaj esperantistoj. Nu, estis bone pripensumi, sed ni evitu, ke ni falu kun la pordo en la domon. La patro de Sendependiĝo en Demokratia Respubliko Kongolando, E. Lumumba Patriko, petis tiun sendependiĝon plej rapide, opiniinte, ke: "Zajrio estas ne donaco al Belgio, sed fundamenta rajto por zajrianoj. Nun, kia estas la situacio en DRK? Ĉio preskaŭ aŭ nenio ŝanĝiĝis...Ĥaosa vivo, malsato, ktp. Do, afrikanoj atentu por ke la esperantumado ne stagnu, ne falu ne disiĝu pro falsaj vortoj kiujn uzas kelkaj esperantistoj kun la celo ke la movado ne disvastiĝu en la regionoj, kie Esperanto famiĝas kaj kreskas rapide kaj kunlaboreme kiel okazas en Burundo kaj en DR. Kongoj kie agas tre viglemaj kaj decidemaj kaj entuziasmaj esperantistoj.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

La movado en Burundo estas ege laborema, multaj gejunuloj atestilojn ricevis kadre de ILEI kaj helpe de ANEB-anoj, kiuj unuafoje deponis kiam ni kongresumadas afrike disdonis atestilojn por kuraĝigi ilin en la lernado kaj en la varbado de Esperanto. Tio estas grava pensmaniero por verdigi nian Kontinenton. Okazis ekzamenoj de ILEI, kaj sukcesis kelkaj laboremaj esperantistoj kaj unu inter la du bravuloj estas mia lernanto. Kio impresis min estas la afableco de la organizantoj de la Kongreso nome Jeremie S kunlabore kun Adje el Togolando, kiuj nokte kaj tage devis respondi al ĉiuj bezonoj, demandoj kaj solvi problemojn ene de la Kongreso kaj eksterkongrese. Multaj gelernantoj estis subtenataj finance. Transporto por ke ili rehejmiĝu, estis pagita al ili. Tiu eksa Prezidanto de Afrika Komisiono, nome Adje kaj Kofiĉe kaj ankaŭ aliaj lokanoj kiel Hasano, Patriko, ambaŭ Gilbert, Tvalibu, Francesco M, Maertens kaj aliaj entuziasme kunlaboris egalnivele en paco, en intensa interkompreniĝo. La ekskurso okazis en la urbeto Rumonge, sed iom for de tiu urbeto en varmega akvafalejo. Preskaŭ 90 % de la ekskursanaro banumis en la varmega akvo. Poste, ni iris ĉe la plej profunde granda lago Tanganjiko kie ĉiuj geeksursanoj fotis sin kaj eĉ « MUKKUMIS ». Mukeke estas speciale bongusta fiŝo, kiun la fiŝkaptistoj kaptas en la lago kaj vendas. Ĝi estas la unua ŝatata fiŝo en la orienta parto de Afriko. Kaj do, estis decidite uzi la verbon "MUKKUMI", kies verbo ne ekzistas en la E-Vortaroj. Okazis koncertoj, dancoj, matĉo ktp.

La plej grave sopira revo de esperantistoj en Afriko, ĉie en esperantujo, estas, iam en 2022, okazigi UK-on en Afriko, por ke ĉiu certigu ke Esperanto ne estas eŭropece farita lingvo por eŭropanoj, kvankam lulile kreita de eŭropano kies nomo estas L.Lazaro Zamenhof. Pro la neo ricevi vizojn por afrikanoj la kuraĝaj geesperantistoj, plibone kaj nun cerbumadas kreante projektojn, iniciatojn por ke okazigu ni afrike UK-on. Estis protestoj kaj diskutoj en la Kongresejo pri tiu plano okazigi UK-on en Afriko, kaj multaj komencas perdi esperon ĉar neniam UK-umas. Inter la esperantistoj, unuj pensas, ke pli bone krei MALJUNULARAN ASOCION de esperantistoj kaj pensi pri tiu SENDEPENDIĜO. Kaze ke ĝi efektiviĝu, aŭtomate okazos UK-o en Afriko ĉar eksterafrikanoj neniam bonvolus ke ĝi estu en Afriko laŭdire. Kio mankas al afrikanoj por UKumadi afrike? Ĉu malmaturiĝo? Ĉu pro financmanko? Ĉu pro malsekureco? Jeremie Sabiyumva estas agemulo, li devis ĝis lastminute atendi kaj certigi ke ĉiuj gekongresanoj sukcesis forlasi la Kongresejon kaj eĉ elspezis monon por eksteraj-kromaj kongresaj celoj kaj bezonoj por kontentigi kelkajn esperantistojn, viktimojn de ŝtelado, perdado ktp. De kie venis tiu ekstera mono? Ĉu de lia poŝo? Vere tre afabla homo, tio ege impresis nin ĉiuj, kunlabore kun Hasano kiu estas saĝa homo kun pacaj vortoj. Miura en Malagasio kaj Mana Brinson en DR. Kongo okazigis la Matenan Diservon en la blanka ĉambro, kio allogis multajn kristanojn, kie ni provis tridekminute prediki, kanti kaj preĝi. Do, la Kongreso estis sukcesa, kultura sed ankaŭ etose paca, bone organizita kaj planita. Okazis rezolucioj ege gravaj. Esperantistoj engaĝiĝis kunlabori ĉu grupe, ĉu klube, ĉu vatsape ĉu asocie por disvastigi nian verdantan lingvon Esperanton.

Nu, sukceson al niaj samideanoj en Burundo kiuj gastigis ĝin kaj gratulojn! Estu fieraj pro via agademeco kaj kune kun ni ĉio iris glate kaj mojose.

Verkis, **Mana Namutema Brinson** en DR.Kongo.



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Lingvo Demando de Bob Felby

Karaj spertaj esperantistoj, i. a. miaj bonaj amikoj Peter Weide kaj Marcelo Leereveld!

Jen io, kio ofte maltrankviligas ordinarajn geesperantistoj.

- A. “Mi vidis ŝin kun ridinda ĉapelo sur la kapo”.
 B. “Mi vidis ŝin kun ridindan ĉapelon sur la kapo”.

Kiu surhavis la ridindan ĉapelon en A?

Kiu surhavis la ridindan ĉapelon en B?

Malgraŭ tio multa, pri kio klarigas Marcelo ĉiun semajnon, li ankoraŭ ne klarigis al neesperantologoj pri ĉi tiu scienda malfacilaĵo.

Jen alia amuzaĵo:

- A. Mi aŭdis ŝin klarigantan etan problemon al la fileto.
 B. Mi aŭdis ŝin klarigante problemeton al la fileto.
 Kiu klarigis la problemon al la fileto en A?
 Kiu klarigis la problemeton al la fileto en B?

Ĉu vi volas pli da problemoj? Mi bedaŭras, sed mi ne deziras plenigi la tutan “Aŭstraliaj Esperantistoj” per miaj ideoj, kaj cetere, nun mi estas iom pli ol nur iomete laca!



Bob Felby



(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917)

Tri participoj en mia ĝardeno.

TRIA VERBA PARTICIPO EN “LA LETTRE SERA ENVOY’EE DEMAIN MATIN”

Ankoraŭ ne venis kritiko al mia tezo, ke en la franca, la angla, la germana, kaj aliaj eŭropaj lingvoj ekzistas tri definite apartaj participoj, do ke en “The letter will be *SENT to-morrow morning*” la participo “sent” havas nenian signifon de pasinteco, nek de iu tempo.

Nek venis kritiko al mia tezo, ke la eŭropa ŝanĝo el de la formo de la Preterito la preterita signifo estas ŝanĝanta al la formo de la Perfekta Tempo, kaj ke tio kaŭzas tiurilatajn erarojn en la Esperanto de la eŭropaj Esperantistoj.

Se ne venos, mi mencios mem kelkajn kritikojn kiujn mi aŭdis, kaj penos refuti ilin.

La problemoj tamen estas malfacilaj. **Por la unua**, pri la tri participoj, estas natura, ke la Esperantologoj kredas la miskoncepton de la eŭroplingvaj lingvistoj. Ĉar en Esperanto la adjektiva participosistemo estas regula kaj konsekvenca, oni ne povas kompari ĝin kun la eŭropaj, sed la Esperantistoj tamen faras tion, kaj pro tio malĝuste uzas la tempojn. Tiom ke la Akademio stulte decidis, ke en la Pasiva Voĉo (ne en la Aktiva Voĉo) la sufikso “-ita” signifas la prezencon post la preterita “estis”, dum ĝi plu signifas la pluskvamperfekton. La



Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

rezulto estas du pasintaj tempoj por unu pasinta ago. Ilia imitado de la etnaj lingvoj konfuzas ilin kaj konfuzas la aferon.

La dua problemo, la ŝanĝiĝo de la preterita tempo, estas problemo nur por la Esperantistoj, ĉar ili devas serĉi la ĝustan tradukon en Esperanton, dum la neesperantistoj faras tion intuicie. Ili tradukas kutime en la Esperantan Preteriton la etnajn Perfektojn, ĉu tiuj signifas la Perfekton aŭ la Preteriton. Estas eĉ ebla, ke la etnaj lingvoj ŝanĝadas la signifojn de la Preterito kaj de la Perfekto en unu komunan miksaĵon. Tio kaŭzos malprecizecon en la etnaj lingvoj, dum la precizecon Esperanto retenos sen scii kiel fari la tradukojn. Ni vidos. Sed la angla lingvo aspektas rezisti tiun ŝanĝon, kiel ĝi rezistas ankaŭ la perdon de la Daŭra (Kontinua) Tempo.

Marcel Leereveld.

HURAH ! BONEGA !

Kara Peter! Povus esti verkinta tiun konsilon kiel instrui la tempojn, mi. Bonega!

Sed mi ne petis la legantojn diri siajn opiniojn pri miaj tezoj kiel instrui la lingvon ! Ni ne bezonas diskuti tion, ĉar ekzistas multaj Esperantistoj kiuj instruas la lingvon per perfekta metodo. Tute ne necesas diskuti la instruadon. Kaj ci kaj mi evidente instruas, al niaj lernantoj, malgrandajn mensogojn, por plisimpligi la instruadon; ekzemple mensoĝetoj ke “-anta/-ata” reprezentus la Prezencon. Same kiel ni mensoĝetas al junaj infanoj pri Kristnasko kaj pri Santaklaŭzoj.

Mi iomete instruas en mia rubriketo pri “La Verbo en P.A.G.”, sed en miaj aliaj artikoloj mi parolas al sciencemuloj, al tiuj spertaj kaj spertegaj Samideanoj kiujn interesas la sciencaj aspektoj en la lingvo Esperanto. Oni povas ekzameni tiun parton de la lingvo kiun oni deziras instrui, sed aliaj homoj deziras profunde kompreni la strukturon, la arĥitekturon, de Esperanto.

Observu “Plena Analiza Gramatiko de Esperanto”, 509-paĝa, kiu intencas i.a. instrui al ni la tialon kaj originon de la demando “kial ne la akuzativo en ‘ni elektis lin prezidanto’”. Ci kaj mi ne montras al niaj lernantoj tiun libron dirante “Tion vi devas scii pri la gramatiko “. Multaj spertaj Esperantistoj ne volas scii la arĥitekturon de Esperanto, ili kontentas scii la uzadon de la lingvo perfekte. Ili neke interesiĝas pri eventualaj eraroj aŭ mallogikaĵoj: ili lasas al ni, al P.A.G., kaj al ci kaj mi, zorgi pri iu perfekteco necesa, same kiel ĉiu etna lingvo estas perfekta por siaj parolantoj sed en alia maniero ol por Esperanto, kiu dependas de la Fundamento kaj de nia korektado kaj ŝanĝado kaj ekzamenado. Se kelkaj “Esperantistoj” ne volas bezoni nin, t.e. P.A.G.-on, cin, vin, min kaj la Akademion, ili ne interesiĝas pri la sukcesa disvolviĝo de Esperanto.

Kaj ŝanĝojn, en la kadro de la Fundamento, oni bezonas. Observu la paĝojn 150 ĝis kun 156, kaj sur paĝo 157 la “Resumo”n de tiuj paĝoj 150 ĝis kun 156 pri la Kompleksaj tempoj en Esperanto. Por via informiĝo kiel mistrakti la logikon de nia lingvo mi kopias tiun “Resumon”.
“RESUME:

Se en certa okazo oni volas ekscii, kiun formon oni uzu oni povas procedi jene:

1). Oni formu el la verbo pasivan participon preteritan, kaj oni esploru la ideon, kiun tiu participo izolite elvokas:

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

a) la participo elvokas ideon pri ĉeso de ago; tiun ideon oni povas senmanke esprimi per la neata prezenca participo: “konita” signas nenion alian ol “ne plu konata”, aŭ “jam ne konata”; same, “memorita, tenita, sciita” ktp. Se la verbo estas tia, oni povas uzi nur kaj sole la imperfektan formon (kun “ata”), ĉar temas pri verbo de daŭro sen rezulto.

b) la participo elvokas ideon pri stato, pri rezulto, pri preteco kaj oni tute ne pensas pri tio, ke la ago mem jam ĉesis, aŭdante: “konstruita, perdita” oni sentas akcentita ne la ĈESON de la agoj “konstrui” kaj “perdi” sed ilian PLENUMIĜON. Se la verbo estas tia, oni uzu:

aa) imperfekton (-ata) por esprimi ago-daŭron, aŭ koincidon kun alia samdaŭra ago;

bb) perfektan (-ita), ĉiam cetere.

2) Por kontrolo, oni transformu la verbon en aktivan kaj almetu “ad”. Se tio ne ŝanĝas la sencon, oni uzu “-ata”. Se “ad” ne taŭgas, oni uzu “-ita”. Kp. ekzemple “mi, kiu vokadis al Dio kaj estis aŭskultata” (Zamenhof: ljobXII 4). Ekz. “la letero estis skribita hieraŭ > oni skribadis la leteron” “ad” ne taŭgas, ĉar ĝi ne esprimas, ke la letero iĝis preta, do “skribita”; “la domo estis konstruita dum du jaroj > oni konstruadis > “ad” ne ŝanĝas la sencon, do “konstruita”, “la ŝlosilo estis perdita > oni perdadis > “ad” ne taŭgas, do “perdita”; “la tagoj estis perditaj per bagatelaĵoj > oni perdadis” do “perdataj”; “la leĝo estis akceptita; la kunsido estis malfermita” (ĉar oni ne akceptadis, nek malfermadis ilin).

Se la verbo estas preterita, oni esploru, ĉu la antaŭtempeco ne estas esprimenda por eviti konfuzon; t. e. ĉu ĝi sufiĉe certigas la kuntekston. Se ne, oni uzu la adverbojn JAM (ĉe sendaŭraj verboj) aŭ ANTAŬE (ĉe daŭrverboj). (P.A.G. paĝon 156)

Nu, por scii ĉion pri la afero de kompleksaj tempoj en Esperanto, oni devas studi ankaŭ la kvar antaŭajn paĝojn. Tre malmultaj spertaj Esperantistoj faris, faras, aŭ faros ĉi tion. Kaj certe ne la plejmulto de la Akademianoj, kiuj tamen devas decidi pri gramatikaj korektoj kaj (Fundament’ecaj) ŝanĝoj. Kvankam preskaŭ ĉiuj aliaj gramatikaj temoj traktatas de P.A.G. normale kaj logike kaj nekomplike, estas ridinda, ke ĝi devas trakti la temon de la kompleksaj tempoj en tia Esperante “neprofesia” maniero, dum la cetero de la gramatiko en la libro klaras kaj logike kaj simplas kaj fideblas. La aŭtoroj komprenis tion mem, menciante ke ili devas trakti la kompleksajn tempojn malsame por la Pasivaj ol la Aktivaj tempoj, simple ĉar la Aktivo havas unu verbon dum la Pasivo devas uzi du. Ili do kreis senkulpiĝon dirante ke la sufikso “-ita” havas du signifojn. Se Esperanto estus havinta, dum la tempo de Waringhien kaj Kalocsay, unuverban Pasivan Voĉon kun sia speciala sufikso, kiel Zamenhof unue intencis, ne ekzistus la kvereloj pri ita/ata nek la kvin nelogikaj paĝoj en P.A.G., nek la miloj da participoeraroj en la Esperanta literaturo. Sed nun ke mi trovis la solvon, ne ekzistas tialo kial havi la problemon. Alivorte: ĈIUJ ESPERANTOLOGOJ KIUJ ANKORAŬ NE ADOPTIS MIAN SOLVON ESTAS KULPAJ, kaj mi akuzas, KE PLU EKZISTAS TIU PROBLEMO KUN SIAJ NOMITAJ KONSEKVENCOJ, NOME LA ITA-ATA BATALO NEFINITA, LA KVIN PLEJPARTE IDIOTAJ PAĜOJ EN P.A.G., LA MILOJ DA PARTICIPAJ ERAROJ, KAJ LA HONTO KIAM LA KONTRAŬULOJ DE ESPERANTO ELTROVOS NIAJN MANKOJN LINGVISTIKAJN.

Resume: En mia uzado de la Fundament’eca gramatiko de Esperanto, mi bezonis nur kvaronon paĝon por lerni la uzon de la tempoj, anstataŭ la dek paĝoj en P.A.G.

Mi en la komenco lernis ke verbo indikas plenan agon de komenco ĝis fino, kaj ke nur vortoj finiĝantaj per la finaĵoj –as, is, os, us, u, kaj i estas verboj.

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE

Duonvoje en la kurso mi lernis, ke kompleksaj tempoj ne ekzistas en Esperanto kaj ne bezonas ekzisti, ĉar oni uzas inter la agoj la adverbojn "antaŭe" kaj "poste" kaj "samtempe" kaj aliajn.

Nur ĉe la fino de la kurso mi lernis, ke ekzistas la eblo mencii la staton de persono aŭ de io koncerne iun agon, nome la staton pro iu pasinta ago, per "-inta kaj -ita", la staton pro iu venonta ago, per "-onta kaj -ota", kaj la staton en la mezo de iu ago, per "-anta kaj -ata".

Kaj mi ne devis lerni, ke ekzistas daŭraj kaj nedaŭraj verboj, ĉar tion oni sentas aŭtomate sen scii.

Sed malbonŝance mi ne inventis la unuvortan Pasivan Voĉon dum la tempo de Waringhien kaj Kalocsay. **Marcel Leereveld.**



Turka Stelo

Koran dankon pro la januara numero de Turka Stelo.

[Turka-Stelo-2020.01.pdf](#)

Tiel rapidaj ni ne estas pri Ora Ĵurnalo, ni eĉ ne komencis pri ĝi, ĉar Kristnasko estas granda festo en Svedio, kaj parencoj kuniĝas. La novan jaron ni bonvenigas meznokte la 31an de decembro per artfajrado. Mia komunumo Lerum, ekster Gotenburgo ĉesis pri la artfajrado, konsiderante la influon al la medio kaj la protestojn de hund- kaj katposedantoj, kies dombestoj timiĝas je la bruoj kaj eklumo. Sed en Gotenburgo granda artfajrado restas. Belege!



Mi rekomendas vian revuon "Turka Stelo" al miaj esperantoparolantaj geamikoj!

Siv Burell el Svedio

[Turka-Stelo-2020.01.pdf](#)



"Bezonatas"

Estimata redaktoro, mi vidis en PReVo signifoklarigon, kiu tute surprizis min, tio estas la uzo de pasiva verbo, efektive la vorto "bezonas". Jen la kunteksto de ĝi. "VOLUPTEMA ... ĉu bezonas por li, voluptema pigro, la vivo, kiun ni tre deziras?"

Sendita de **Vere Williams.**



3ZZZ ... La elsendo de la 30a de decembro prezentas kompetentan muzikiston

Gijom Armide kaj priskribas kiel dancas ĉimpanzoj .

Feliĉan jaron deziras al vi la teamo de 3zzz . Ni ankaŭ atentigas vin ke ne povas esti vera feliĉo sen aŭskultado de la programo en Esperanto dissendita de 3zzz.



Informas la kunvokanto, **Franciska Toubale**

Se informo pri via novaĵo mankas, la kialo estas ke neniu informis AE